L E T E R O nro 136 2.11.1945.

Sendis: Oskar Svantesson, Fågelfängaregatan 20, Göteborg, Svedujo. --- Aperas laŭeble semajne. Abonprezo: 20 nroj kostas 5 kr, 50 nroj 10 kr. Poŝtĝiro 62252. --- Via abono finiĝos per tiu numero, kiu estas indikita sur la koverto.
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Niaj handikapoj. Mi legis en la gazetoj, ke la iama prezidanto de Brazilo, sro Vargas, estas tenata en malliberejo en sia bieno. Sed pli multe mi fakte ne scias pri la afero. Almenaŭ nia cerbo estas sufiĉe limigita , kiam temas pri tenado de la ĉiutagaj novaĵoj. Oni legas kaj legas amason da novaĵoj, sed ne povas teni en la kapo ĉiujn. Mi nun volus scii pli multe pri la afero, ĉar la iama prezidanto ja havis grandan intereson pri esperanto. Se ni nun havus la ordinarajn eblecojn de la grandaj gazetoj, ni povus sendi demandajn telegramojn ktp por ekhavi informojn. Sed por tio niaj rimedoj estas multe tro malampleksaj. Ni povas skribi al Brazilo, sed informojn pri la afero ni ricevus post nur tre longa tempo. Jen por ni granda malfacilaĵo, kiam ni volas en esperanto produkti "gazetojn". Ni ne havas la monajn rimedojn, ni ne posedas la bezonatan tempon por fari esplorojn, ni ne havas ian organizon kun korespondantoj en ĉiuj landoj, kiuj havus je sia dispono sufiĉan sumon por povi telegrafe sendi raportojn pri la esperantistaj okazintaĵojn. Sed --- tion ni devus iel venki. Ni laboru por ke ni havu almenaŭ korespondan reton ĉirkaŭ la mondo. Ni havas pli grandajn eblecojn ol iu ajn en tiu sfero, ĉar ni havas lingvon, kiu estas komuna por ĉiuj landoj. Ni ne bezonas traduki, ni ĉie komprenas unu la alian. Pro tiuj kialoj ni havas ankaŭ kelkajn avantaĝojn je nia flanko, kaj ni laboru por plimultigi ilin.

Somera universitato. La jarkunveno de SEF ja okazos pentekoste en Uddevalla. Ĝi estos sekvata de Somera Universitato, pri kiu oni ĵus traktas. Eble oni havos subtenon de ABF. Kondiĉo tamen estas, ke oni povas al ABF prezenti la programon, kaj tiu ankoraŭ ne estas preta. Ni tamen esperu, ke la Universitato okazos, ĉar certe ĝi estos bona aranĝo en la movado.

Kristnaska foiro. En Malmö la tiea klubo aranĝos kristanskan foiron la 1-an de decembro. Oni ŝajne intencas aŭkcie vendi diversajn varojn, kiujn la membroj donacu al la foiro. La nutraĵreguliga aŭtoritatoj tamen 14 tagojn antaŭ la aŭkcio deziras liston pri la vendotaĵoj. Tial oni petas, ke la membroj jam la 7-an de novembro anoncu, kion ili intencas donaci.

Sro Nylén la 9.11 vizitos la esperantoklubon de Västerås, kie li en la sveda rakontos pri la temo När esperanto kom till Sverge. La parolado konsistos el libere el la memoro donitaj informoj pri la unua tempo de la esperanta movado en nia lando. ---- La esperantokurso en Västerås kolektis 8 partoprenantojn.

La lingvo ŝanĝiĝas. Nun ne temas pri nia esperanta lingvo, sed pri la sveda. Almenaŭ skribe oni preskaŭ ĝis nun en la sveda lingvo provis restigi la hereditan kutimon, uzi diversajn formojn de la verbo en singularo kaj pluralo. Sed dum la lastaj jaroj, eble jardekoj, aŭdiĝis voĉoj por transiro al ununura formo, sama por la du nombroj. El la parola lingvo la diferenco malaperis antaŭ jarcentoj. Oni tute ne povas trovi svedon, kiu parole uzas malsamajn formojn por singularo kaj pluralo. Pro tio modernaj lingvistoj pledis por tio, ke ni transiru al pli simpla sistemo ankaŭ por la skribo, ĉar tre multe da laboro oni devas dediĉi al la lernado de la diversaj formoj. Kaj oni opiniis, ke estus pli bone uzi la tempon perdatan en niaj lernejoj

por pli utila temo. Kaj kompreneble temas ankaú kaj ĉefe pri lingva sento, pri korekteco. Oni opinias, ke la parola lingvo estas la origina, kaj se estas diferenco inter la du, la skriba lingvo devas sekvi la parolan. Iom post iom pli kaj pli da verkistoj kaj gazetoj transiris al la nova modo, kaj nun el 134 pli gravaj gazetoj kaj ĵurnaloj nur 65 tute aplikas la duoblajn formojn.

Kvardekjara esperantoklubo. En 1946 la esperantoklubo de Malmö festos sian 40-jartagon. La kluba gazeto informas, ke la solena festo pro la jubileo okazos la 22-an de Aprilo 1946. Oni esprimas spceialan esperon pri vizito de multaj amikoj.

Internacia Semajna Letero. aperis per sia dua numero. Eldonanto estas sro Otto Pellikainen, Seinäjoki, Finnlando. Nun la letero havas presitan kovrilon. --- Sro Einar Adamsson sendis Esperanto-Airut al skota samideano, kio kaúzis dankan leteron de li, en kiu xx li proponas sian kunlaboron en la gazeto. Tio eble povas esti de certa valoro, ĉar la skoto estas redaktoro. Li inter alie diras, ke la skotoj ne estas tre entuziasmaj por esperanto, sed ke li esperas, ke la registaro baldaú tiom interesiĝas pri esperanto, ke ĝi ĝin enkondukos en la lernejojn. Ĝis nun oni povas lerni esperanton nur en la vesperaj lernejoj dum la vintro. Oni havas multajn esperantoklubojn tra la tuta lando, sed la milito malhelpis ilian agadon, kaj kelkaj ne plu funkcias.

Propagando en la Seminario de Strängnäs. Sro Beckman en Strängnäs dum la esperanta semajno propagandis esperanton inter la seminarianinoj de Strängnäs. Li ankaú intencas sendi cirkuleron pri esperanto al la instruistoj de la gubernio de Södermanland. Same hi parolos pri nia lingvo en Strängnäs kaj en Birkagården en Stockholm. Laste, li sendis monsumon al Korte por ke tiu havu ioman kapitalon por starti la novan instruistan movadon. Tamen, la malfacilaĵoj pri monsendoj nuntempe estas grandaj, kaj sro Beckman ne povas garantii, ke la sumo atingos sron Korte.

Gazetara servo. Mi pro letero de Malmgren dissendis novaĵon al la gazetoj. pri la Brazila broŝuro pri Santos Dumont. Brazilo ja eldonis broŝuron en esperanto pri tiu unua flugisto en la mondo. Li en 1906 flugis 220 metrojn dum 21 sekundoj kaj per tio starigis x la unuan mondrekordon en distanca flugado. --- Mi konsilus peti la broŝuron ĉe Ministerio por Eksteraj Aferoj, Rio de Janeiro, Brazilo. Eble oni ne ricevos la broŝuron, sed oni montros, ke esperanto vivas.

Radia programo. Malmgraú miaj demandoj al diversaj landoj, mi ne ricevis direktajn informojn pri la sendotempo de diversaj radiostacioj. Sed laú informoj ĉerpitaj el diversaj fontoj la dissendoj okazas laú suba listo. Se iu sukcesis aúskulti iun aú alian stacion kaj do povas verifiki la ĝustecon, mi estus tre danka, se vi volus sendi informon. Do, sendoj okazas: Tempo MET.

Ĉiutage	2300-2315	Praha 31,41 m 1571 m Oficialaj informoj
Dimanĉe	1030-	BNRO Kortrijk, Belgujo 202,5 m Parolado
Lunde	2110-	Lyon
Lunde	2220-2230	Praha I 1571 kaj 470,2 m Informoj
Merkrede	1700-	Sofio, Bulgarujo 352 m Parolado
Ĵaúde	2220-2230	Praha I 1571 kaj 470,2 m Informoj
Vendrede	1545-	WRJN Racine, Wisc. Usono ?m Parolado ktp
Sabate	2000-2045	PRA2 Brazilo ?m Paroladoj pri esp.
10.11.45	1930-1945	3SR Aústralio 238 Novaĵoj.

La esperanta vivo en Skövde. Merkrede la 7-an de novembro startos daŭriga kurso en Folkskolan, Östra skolhuset, je 1930 h. La kurso ampleksos legadon, tradukadon, gramatikon, konversacion, interpretadon. Ĉio estas plaĉe aranĝita en lecionetoj je 20 minutoj. Celo: bonaj esperantistoj, kiuj ĉe korespondado kaj vojaĝoj kapablos praktike uzi la lingvon.

La 8-an de novembro je 2000 h la esperanta klubo havos en hotelo Billingen festena kunveno. Orkestra muziko, ĥorparolo, kanto kaj parolado de membroj de la kurso en la popollernejo. Mallonga prelego, kafotrinkado, demanda kvaronhoro, ekspozicio ktp. Al tiu vespero oni persone invitis ĉ. 200 membroj de diversaj idealismaj kluboj en Skövde.

Sabate la 10-an de novembro la membroj de la esperanta klubo kaj ceteraj esperantoamikoj estas bonvenaj al Junulara kunveno en Skövde församlingshem. Skövde Kyrkliga Ungdomsförbund invitis kaj Sven Jivegård parolos pri la temo Fånge eller fri? (Libera aŭ mallibera?) Oni montros filmon, regalos per kafo, prezentos liutan kantiston ktp.

Por faciligi al la membroj de la esperanto klubo fari vojaĝojn oni startis ŝparklubon, kiu aliĝis al Postsparbanken.

Kurso por komencantoj ekos ĵaŭde la 15-an de novembro je la 1930 h en Folkskolan.

Jen la teksto de la parolĥoro: Ni estas junaj. La estonteco apartenas al ni. Por ni la mondo malfermis sin, ĉar ni parolas la interpopolan lingvon. En ĉiu kontinento, en ĉiu lando atendas nin junaj geamikoj. Ili deziras kontakton kun ni per la komuna lingvo.
Ni havas jam kaj havos korespondantojn en multaj landoj -- gejunuloj kiel ni mem. Ni vojaĝos fremdlanden por viziti niajn samideanojn, ni akceptos ilin tie ĉi. Nia devizo estas: Paco, interkompreno, vera fratiĝo -- de koro al koro. Vivu la bela Esperanto!

Ĉinoj, hindoj, afrikanoj,
angloj, francoj, svedoj, danoj,
homoj en la tuta mondo
estu unu frata rondo.
Sonu forte nia kanto
Vivu bela Esperanto!

Kanto: (Mel.: Plocka vill jag skogsviol....)

Kolektos, kolektados mi en la arbarsalon
plenbrakon da erik, viol -- kunligos al florkron
Pirolo, timiano pri la amik pensigas min --
kaj multon ekmemoras mi kun floroj en la sin.

Jen la vojeton. kiun ni en la vespera pac
promenis kaj jen sidis ni sur mola muskmatrac
Se eĉ alia estus, al kiu manon donus vi --
ĉe vi en revoland kun am fidela restos mi.

Tutsola mi fariĝis nun kaj sola iros mi
sen famo kaj sen mono surtere tie ĉi.
Neniu ŝteli povas trezoron mian de memor --
mi estas tiom riĉa en somernokta hor.